Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaudon la 24-an de aprilo 2025 per Zoom

Ĉeestis Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Claude Rouget, Lars Sandbakk kaj Marianne Lund.

1. Aprobo de la tagordo
La tagordo aprobiĝis.

2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 20-an de marto 2025
Aprobiĝis la protokoloj de la februara kaj marta kunvenoj kun kelkaj aldonoj.

3. Esperantonia
Niaj luantoj ekuzis la kunvenejon de Esperantonia por sia ĉiutaga laboro, pagante monatan lupagon (4600 kr. + elektro) dum provperiodo ĝis inkluzive junio. En julio ni planas ordigi (laŭ klaraj, anticipe deciditaj principoj) la supran oficejon, suban koridoron kaj kelon kaj dungi profesian firmaon por purigi ilin. La luantoj proponas, ke la supra oficejo post la ordigado restu nur por nia uzo kaj ke ili, ekuzante denove la kunvenejon en aŭgusto, plu pagu la saman, nunan lupagon. La estraro opinias tion bona propono.

Oni konstatis, ke en Esperantonia ne estas grandaj problemoj pri humideco. La fenestraj framoj tamen bezonas ioman riparadon kaj devos farbiĝi per «spiranta» farbo. Necesas venigi elektriston, kiu pritaksu la ĝeneralan staton kaj sekurecon de la elektra sistemo.

4. Jarraporto 2023 La jarraporto estas preta por prezentiĝi al la landa kunveno en junio.
5. Jarraporto 2024 La jarraporto estas preta por prezentiĝi al la landa kunveno en junio

6. Landa kunveno 2025
La tagordo de la landa kunveno estas preta. Ni dissendos ĝin kaj la ceterajn kunvenajn dokumentojn al la membroj antaŭ la 5-a de majo. La estraro proponos, ke la laborplano restu senŝanĝa.
La estraro rekomendos, ke la kotizo por 2026 estu sama, kiel por 2025 (390 kronoj).
Bård kontaktos la elektan komisionon.
Kjell Heggvold Ullestad akceptis la proponon fari prelegon post la oficiala parto de la landa kunveno.

7. Norvega Esperantisto, Esperanto-Nytt kaj la Nacia Biblioteko
Jardar retpoŝte petos al la Nacia Biblioteko sendi kontrakton. Norvega Esperantisto estu afiŝita plentekste de ĝia unua apero, sed kun kopirajto ĉe la verkinto. Esperanto-Nytt estu je ĉies libera uzo.

8. Porkomencanta kurso 2025
Okazis reta kurso pri Esperanto por komencantoj dum kvar merkredoj en marto-aprilo. Partoprenis tri (kvar) personoj. Instruis Marianne.

9. Eventualaĵoj
Claude nome de NEL sendos kvar petojn al legaco Uhlen, pri:

- Norvega Esperantisto en koloroj – 30.000 kr.
- Renovigo de Esperantonia – 40.000
- Anonco por kursoj en Facebook – 10.000
- Operasjon Dagsverk 2024 – 5000

10. Venonta estrara interkonsiliĝo
La venonta estrara interkonsiliĝo okazos ĵaŭdon la 22-an de majo 2025 je 20.30.

Protokolis Marianne Lund